



LA SKOLTA MONDO

OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTISTA LIGO

Redakcio Bamblev 2 N3700 Skien

NE ISSN 0037-6558



Numero 2

Meze 1987

La ESTONTECO de SEL.

Grava komuniko !

Karaj geamikoj de SEL,

Vere estas iom malfacile, skribi jenan komunikon al vi, tamen ĝi devas okazi.

Jam dum pli ol 20 jaroj mi servis la Ligon kiel sekretario, kaj nun mi opinias ke la momento venis por adiaŭi vin.

Skoltado estas organizaĵo por junuloj, kaj de junuloj. Kaj malgraŭ mia deziro: mi ne plu apartenas al la junuloj.

La redaktoro de La Skolta Mondo jam en la pasinta numero anoncis ke ankaŭ li deziras ekŝiĝi el tiu posteno. Ĉar li decidis fari ankoraŭ unu numeron, mi nun agas kiel gast-redaktoro.

Kaj por diri la veron: ankaŭ la kasisto jam dum dekoj da jaroj aktivis por SEL, kaj kvankam li volas resti ankoraŭ fidela al la Ligo dum iom da tempo, estus bone, kiam ankaŭ por li nova persono estus trovata.

Eble la Jubilea Jaro de Esperanto ne estas la ĝusta momento por prezenti al vi tiujn aferojn. Sed se nia Ligo vere havas utilon, kaj vere vivas, ĝi certe povos venki la nunajn malfacilaĵojn.

En aprilo mi havis interparolon kun la prezidanto,

kiam li vizitis Nederlandon, kaj ni decidis pri jena programo:

1- en majo mi informos la homojn kiuj estas iom forte ligitaj al SEL, i.a. la reprezentantoj, per nia bulteno "ĈIAM PRETA". (do jam okazis).

2- komence de julio mi prezentos la aferon al la tuta membraro, per la gazeto "La Skolta Mondo". Tio do nun okazas.

3- en la fino de la jaro la oficiala redaktoro Hans Rosbach prezentos al vi sian adiaŭnan numeron. Se eble ni en tiu numero prezentos al vi la solvojn por la nunaj problemoj.

SED...

tiuj solvoj tute dependas de la kunlaboremo de la membroj de nia Ligo. Se tiu kunlaboremo mankas, drastaj decidoj estos necesaj. Tiuj apartenas al programaro numero 4, sed mi estas sufiĉe optimista por ne menciigi tion nun.

Responde al al la informado de niaj reprezentantoj mi jam nun povas informi vin ke por la eldono de LSM solvo kredeble ekzistas. Ĉu du homoj prezentis helpon, kaj post aranĝo de la afero ni prezentos ilin al vi en la venonta numero de LSM.

Tamen: antaŭ la 1-a de majo 1988 SEL bezonos novan sekretarion. Kaj baldaŭ ankaŭ nova kasisto necesos, do estus bone ke jam nun iu sin anonc'as.

Mi nun atendas viajn respondojn.

Bonvolu kompreni ke mi havas plurajn aliajn taskojn, kaj krome mi devas konsulti la aliajn estraranojn koresponde, do bonvolu havi paciencon se la respondo al viaj leteroj ne tuj venas.

Via sekretario,

Ko Hammer.

adreso: Taxusstraat 7

1505 AA ZAANDAM, Nederlando

AVERTO.

Se en la dekstra supra angulo de la etikedo kun via adreso estas NULO (Ø), tio signifas ke vi ĝis nun ricevis LSM senpage por la lasta fojo !

LA OKULO kaj VIDADO.


Nia okulo estas komplika aparato. La vando konsistas el tri tavoloj.

La antaŭa parto de la ekstera tavolo estas la korneo. La interna tavolo estas la retino. Ties celoj povas ŝanĝi la lumon en signaloj por la cerbo. Nervo kondukas la signalojn al la cerbo. Kie la nervo estas ligita al la retino, tiu ne povas ricevi la lumon. Tie estas la tiel nomata blinda loko.

La antaŭa parto de la meza tavolo de la vando formas koloritan ringon, la iriso. En la mezo de la iriso estas truo tra kiu la lumradioj eniras la okulon. Tio estas la pupilo.

En la antaŭa parto de la okulo ankaŭ estas lenso. Tiu zorgas ke ni povas rigardi proksime kaj malproksime.

1. korneo
2. iriso
3. pupilo
4. lenso
5. retino
6. blinda loko
7. nervo



Funkciado.

Facile vi povas imiti la funkciadon de la okulo. Vi prenu skatolon el kartono. En la dorso vi tranĉas truon, kiel fenestro. Vi kovru la fenestron per tra maldika papero, kiu estas travidebla, aŭ per maldika blanka plasta folio (ekzemple de butika sako).

Meze en la fronto vi faru trueton.

Nun la lumradioj povas veturi tra la truo ĝis la fenestro, kaj tie ili 'desegnas' bildon de la cirkaŭaĵo.



La bildo estas malforta. Vi pli bone povas vidi ĝin, kiam la fenestro mem estas en mallumo. Ekzemple kiam vi kovras vian kapon

per malhela tuko.

Tiel ankaŭ faris la fotografoj en antikvaj tempoj.

Vi certe jam iam vidis bildon de ili.

La oficiala nomo por nia skatolo estas: malluma kamero.



Tuta ĉambro kiel kamero.

Iam mi estis en malgranda ĉambro kun nur unu fenestro. La fenestro tute estis fermita per ŝildo el kartono. Tial la ĉambro estis tute malluma. Sed... en la kartono estis truo, kaj nun la tuta ĉambro estis malluma kamero. Sur la muro, kontraŭe al la fenestro, mi povis vidi bildon de la ekstera mondo, sed kun la subo supre !

La Pupilo.

La pupilo estas la truo tra kiu la lumo iras en la okulon. Ĝi havas tre delikatan sistemon por reguli kiom da lumo povas eniri.

Kial la lumo estas forta, la pupilo estas malgranda, sed kiam la lumo estas malforta, tiam la pupilo estas granda.

Du malsimilaj okuloj.

Kovru unu okulon per la mano dum unu minuto. Post tio rigardu viajn okulojn per spuglo.

La pupilo de la okulo kiu estis en la mallumo estas multe pli granda ol la alia.

La retino.

Kiam vi komparas nian okulon kun fotoaparato, tiam la retino havas la saman taskon kiel la filmo. Ili ambaŭ "ricevas" la bildon.

La blinda loko.

La signalo de la retino devos esti transportata al la cerbo. Por tio zorgas la nervo.

En la loko, kie la nervo estas ligita al la retino, tiu ne povas funkcii. Tie estas la "blinda loko".



Eksperimento.

Kovru la dekstran okulon per la mano. Rigardu per la maldekstra okulo la punkton. Vi devos fari kelkajn klopodojn, en diversaj distancoj.

Post kelkaj klopodoj vi konstatos ke vi ne plu vidas la krucon.

En tiu momento la bildo de la kruco falas sur la blinda loko de via okulo.

Ĉiu vidas duoble !

Ni havas du okulojn, kaj ĉar ili estas en du diversaj lokoj, ili vidas malsimilajn bildojn. Mem kontrolu:

Levu la fingron kaj rigardu la vandon de la ĉambro, kiu estas antaŭ vi.

Kiam vi rigardas per la dekstra okulo, vi vidas la fingron ĉe A, kiam vi vidas per la alia okulo, ĝi estas ĉe B.



Kiam ni rigardas ĵetkubon kiu estas meze antaŭ ni, unu okulo vidas ĝin kiel M, la alia okulo vidas ĝin kiel D.

Tamen: en nia cerbo tiuj du diversaj bildoj estas kunfanditaj je unu ĵetkubo !

Tio estas miraklo, ĉu ne ?

Samtempe nia cerbo faras ian kalkulon. El la diferenco de la du bildoj ili "kalkulas" la distancojn ĝis la objektoj.

Ankaŭ pri tio ni povas fari eksperimenton.



Trafi aŭ Maltrafi.

Demandu amikon ke li tenu ringon antaŭ vi. Nun per rapida movo metu la fingron tra la ringo.

Vi certe sukcesis, ĉu ne ?

Sed nun vi kovru unu okulon per la mano, kaj denove vi klopodu meti la fingron per rapida movo tra la ringo, kiun la amiko tenas antaŭ vi.

Vi konstatos ke via cerbo ne plu povas kalkuli la distancon, ĉar ĝi ricevis nur unu bildon.

La cerbo decidas....!

Ĉe fotoaparato nur la "tekniko" decidas pri la bildo kiu ekestas.

Sed ĉe homoj pri tio ne nur decidas la teknikon la okulo, sed la cerbo, kiu donas signifon al la bildoj.


Rigardu la unuan bildon. Kion vi vidas ?

Jes, nur cirklon kaj kvar strietojn vi vidas.

Nun rigardu la duan bildon.

Ankaŭ tio montras nur cirklon kun kelkaj strietoj. Tamen, vi vidas ion tute alian, ĉu ne ?

Alia ekzemplo estas la teksto sub la avertilo. Via cerbo jam decidis kion ĝi "volas vidi", antaŭ ol viaj okuloj vere vidas ĝin. Kontrolu bone: kia teksto estas sub la avertilo ?



La malrapida okulo.

La okulo estas iom malrapida, kiam du bildoj venas unu post la alia. Tiam la okulo intermiksas ilin, ĉar la okulo bezonas iom da tempo antaŭ ol ĝi "fororgesas" la unuan bildon.

Metu la birdon en la kaĝon !


Prenu ŝildeton el kartono, kaj ligu ŝnuron je ambaŭ flankoj, kiel en la desegno.

Turnu la ŝildeton plurfoje, tiel ke la ŝnuroj vindiĝas.

Prenu ŝnuron en ĉiu mano, kaj tiru. Tiel vi povas turni la ŝildeton, kaj kun iom da ekzerco vi povas turni ĝin tiel longe kiel vi volas.

Kiam vi sukcesis en tio vi nun desegnu birdon sur la ŝildon, kaj aliflanke kaĝon, sed kun la supro malsupre.

Kiam vi rigardas la ŝildeton dum ĝi turniĝas vi konstatos ke vi vidas la birdon, sidanta en la kaĝo.




Vido-trompo.

Vi certe jam scias ke vi ne povas fidi la bildon, kiun la okuloj donas al ni.



Rektaj linioj ŝajnas malrektaj, paralelaj linioj ŝajnas estis malparalelaj. (1,2)

Alteco pli imponas ol larĝeco. Kio estas pli granda, la larĝeco de la ĉapelo aŭ ĝia alteco? Kontrolu mem! (3,4)

Ankaŭ la ĉirkaŭaĵo influas la bildon. Kia kvadrato estas pli granda: la dekstra, aŭ la maldekstra? (5)



1



2




3

4



6



5



La Ruza Kelnero.

En restoracio ia gasto plendis, ĉar li opiniis ke la peco de viando estas tro malgranda. Li vokis la kelneron.

Tiu kontrolis la viandon, kaj diras: "Jes sinjoro, vi pravas. Mi tuj donos alian al vi."

Tiel okazis, kaj la gasto estis kontenta.

En la kuirejo alia kelnero demandas: "Kiel vi povis fari tion? Ĉiuj pecoj ja estas precize la samaj?"

"Jes, mi scias. Sed mi simple uzis pli malgrandan teleron por meti la viandon!"

La Svelta Knabino.

Malgraŭ multaj klopodoj la diketa Anna ne sukcesis halti la frandadon.

Tamen unu tagon ĉiuj amikinoj konstatis ke ŝi iom malgrasiĝis.

Ĉu vere?

La nura diferenco estas ke ŝi aĉetis novajn vestojn. (6)

Maturigi tomatojn, kaj fresigi legomojn.

Ankaŭ apudaj koloroj influas unu la alian. Kiam koloro aperas en ĉirkaŭaĵo kiu estas tre malsama, la koloro ŝajnas esti pli brila.

Tial vendisto ŝatas meti la tomatojn apud, aŭ eĉ inter la verdaj legomoj. Tiel la tomatoj aspektas pli ruĝaj, kaj la legomoj pli freŝaj.

Tial etikedo sur banano ĉiam estas blua.

Tiel vi mem povas paliĝi aŭ bruniĝi laŭ dezire. Vi simple surmetu alian bluzon aŭ ĉemizon !

Kuniklo aŭ Anaso ?

"Vere, mi vidis ĝin kun propraj okuloj !"


Eble iu jam tion diris al vi. Aŭ eble vi mem diris tion.

Sed ĉu vi vere estas certa, ke vi rigardis bone ? (7)


En la alia bildo kelkaj homoj vidas junan knabinon, aliaj tamen vidas malbelan maljunan virinon. (8)


Kaj ĉu povas diri kio estas en la tria bildo de ĉi tiu serio: ĉu vi vidas ian staplon de supre, aŭ de malsupre ? (9)

En bildo 10 nepre ne estas spiraloj, kaj la grizaj makuloj en bildo 11 tute ne ekzistas !




9.






10



11



Postbildoj.

Tre interesaj estas la "postbildoj". Kiam la okulo ricevis fortan impreson, oni poste ŝajnas vidi la saman bildon, sed en kontraŭaj koloroj.

Mia vekhorloĝo havas ciferojn el ruĝa lumo. Kiam mi rigardis ilin dumnokte, mi kelkfoje poste vidas la samajn ciferojn en la malluma ĉambro - sed nun ili estas verdaj.

La Portreto.

Fikse rigardu unu punkton de la bildo dum kelkaj minutoj en bona lumo. (12)

Poste rigardu malluman parton de la ĉambro, aŭ fermu la okulojn. Nun vi vidas portreton, blanka sur nigra fono.

(La bildo estas antikva ekzemplo, presita sur poŝtkarto)

Proverbo.
Amo blindigas.



12

MALLONGE.

Ĵamboreo 1987-1988

Ni invitas la membrojn de SEL, kiuj vizitos la venontan mondan Ĵamboreon en Aŭstralio, ke ili anoncu sin ĉe la sekretario, por se eble aranĝi kunvenon.

Ĵamboreo 1991

Iam oni planis Ĵamboreon en Irano, kiu ne povis okazi pro politikaj eventoj. Tio nepre ne okazu duafoje.

La spertoj dum la venontaj Olimpikaj Ludoj decidis pri la definitiva decido rilate la Ĵamboreo 1991.

Reprezentantoj

En Hong-Kong S-ro Lee Teck Shiu ne plu funkcias por SEL. La sama validas por Gelare Matomedi en Irano.

En Aŭstralio S-ino Jennifer Dimo transprenis la taskon de la 'veterano' John Moore, al kiu SEL ŝuldas multan dankon. Adreso de Jenny: 9 Rocky Gully Rd., COOMINYA, QLD 4305.

En Nov-Zelando feliĉe S-ino Gwenda Sutton akceptis la postenon de Reprezentanto. La adreso estas: 21 Rama Crescent, WELLINGTON 4, Nov-Zelando.

Volas korespondi:

F.G.S.LIYANAGE, 197 Indiuitiya Road, Hettigama, Jaela, Sri Lanka, 20-jara skolto pri i.a. Arto, Historio, Literaturo, ktp, kun la tuta mondo.

Esperanto per Komputilo.

"Esperanto first half" estas la titolo de angla-lingva komputila kurso pri la bazaj principoj de Esperanto, uzebla por la Spectrum-48 komputilo.

Al la kurso apertenas 2 kasedojn (unu pri la prononcado) kaj 4 tekstlibretojn.

Eldonas: Lez Peranto, (Lex Hartridge), 74 Devonshire Way, Croydon, Surrey, CRO 8BS, Britujo. Havebla ĉe UEA, prezo Ned.guld. 18.-

Sekvu Doktoron Zamenhof !

Ne, ĉifoje NE temas pri nia lingvo, sed pri la ĉeftemo de nia nuna gazeto: okuloj !

Estas ja granda ĝojo, kiam oni povas helpi aliajn homojn. Jam dum dekoj da jaroj la geedzoj Vera kaj Jacques Tuinder en Nederlando aktivis por AGADO E3, kiu donas helpon al homoj kun vid-problemoj, ĉefe en Afriko.

Klinikoj aktivis, brajlaj eldonoj presiĝas, okulvitroj estas donataj per la kontribuoj de Agado E3.

Helpantoj troviĝas en la tuta mondo. Kiam mona subteno ne eblas, oni sendas vendeblajn varojn, poŝtmarkojn, eĉ skatolojn kun malnovaj okulvitroj !

Adreso: Fam. Tuinder, Henegouwelaan 35, NL 1966 RH HEEMSKERK, Nederlando.

Poŝtĉirkonto de AGADO E3: 1020100.

Moderna Proverbo:

FRATECO VIDIGAS.

LA SKOLTA MONDO.

Oficiala organo de Skolta Esperanto-Ligo.

Redaktoro de ĉi tiu numero: J.K. Hammer, Nederlando.
Normala redaktoro: Hans A. Rosbach, Bambleveien 2, N-3700 SKIEN, Norvegujo.

Prez. Fr. Abriani, Via Falconetto 24, I 37131 VERONA, Italujo.

Sekr. J.K.Hammer, Taxusstraat 7, 1500 AA ZAANDAM, Nederlando.

Kasisto: D.H.Withey, 21 Brookfield Ave , LIVERPOOL L22 3YE, Britujo.

